

Raporto pri la internacia, enreta Esperanto-kurso de la Jagelona Universitato, jun. 2012

En junio okazis la pli frue anoncita oficiala, 20-hora, internacia, lingvoperfektiga Esperanto-kurso de la Jagelona Universitato. Ĝi disvolviĝis plene en Interreto, realtempe. Aliaj du proponoj pri kursoj pri la esperantaj stiloj preskaŭ ne vekis intereson de esperantistoj.

Al la junia perfektiga Esperanto-kurso aliĝis esperantistoj el 5 landoj de 3 kontinentoj: Brazilo (3 personoj), Urugvajo, Katalunio, Nederlando kaj Kongolo.

Konsisto de la partoprenantaro estis jena:

2 instruistoj de superaj lernejoj,

1 instruisto,

Unu el la ĉi-supre menciitaj profesiaj instruistoj + 2 aliaj estas Esperanto-instruantoj.

Do, entute, 5 el la 7 partoprenintoj estas instruantoj. 3 el ili estas Esperanto-instruantoj.

Aliĝis ankaŭ unu studento, el Kongolo (Kongo Brazzaville).

La kursanoj loĝas aŭ laboras en famaj urboj: San-Paŭlo, Montevideo, Barcelono, Amsterdamo, Pointe Noire (la dua laŭ grandeco urbo de Kongolo, post Brazzaville) k.a.

Okazis studado laŭ la planita programo. Iuj el la gramatikaj fenomenoj estis studataj laŭ nova aliro.

La kurso-rilataj spertoj de la studintoj kaj de la kursogvidintino estas tre bonaj.

La studintoj ricevis oficialan konfirmilon de la universitato pri partopreno en la kurso.

Kelkaj el ili deziras plulerni Esperanton en la Jagelona Universitato.

Dum la kursa kontakto la partoprenantoj montris grandan intereson pri la kulturoj de la aliaj studantoj kaj pri tiuj mem. Eksterlecione okazis du spontanaj renkontiĝoj pri interesaj detaloj koncernantaj la lingvojn kaj kulturojn de kursanoj. Ili rezultis el la bezono transdonadi al aliaj siajn interesajn informojn. Okazis ankaŭ interŝanĝoj inter personoj kun similaj profesiaj intereso, t.e., ĉefe pri metodiko kaj organizado de Esperanto-instruado.

La partoprenantoj ankaŭ interkonatiĝis, kaj jam samsomere iuj novaj konatoj renkontiĝis.

Interna raporto pri la kurso por la universitato. Ĝi estis farita en julio 2012.

Ni deziras esprimi koran dankon al la personoj, kiu helpis disvastigi la anoncojn de la Jagelona Universitato pri la kursoj: Maria Nazare Laroca, Renato Corsetti, Adonis Saliba, Yas Kawamura, Anne Jausions, Jozefo Nemeth k.a., ankaŭ tiuj, pri kies helpo ni ne scias...

Maria Majerczak
la kursogvidantino
26 aŭg. 2012